# 108-a Universala Kongreso de Esperanto



TORINO
29 julio -
5 aŭgusto 2023

## DUA BULTENO

KONGRESA TEMO
Enmigrado - kunfluo
de homaj valoroj

# Enhavo


Bonvenon al la kongreslando ..... 4
La kongresejo ..... 5
Utilaj informoj pri Italio, Piemonto kaj Torino ..... 5
Paroligaj kursoj kun edukado.net ..... 7
KER-ekzamenoj de UEA je kvar niveloj ..... 7
Kongresa temo ..... 8
Provizora programo ..... 9
Ĝeneralaj kondiĉoj de mendado ..... 10
Hoteloj ..... 12
Ekskursoj ..... 15
    Antaŭkongresaj ekskursoj ..... 15
    Postkongresa ekskurso ..... 19
    Ekskursoj dum la kongresa semajno ..... 21
        Tuttagaj ekskursoj ..... 21
        Duontagaj ekskursoj ..... 25
    Tabelo de dumkongresaj ekskursoj ..... 29
Bankedo ..... 30
Aranĝoj ĉirkaŭ la UK ..... 31
Pliaj informoj ..... 31
Sekvu nin ..... 32
Kontaktoj ..... 32


# Loka Kongresa Komitato

| | |
|---|---|
| Prezidanto, kontaktoj kun amaskomunikiloj | Michela Lipari |
| Vicprezidanto, kontaktoj kun landaj aŭtoritatoj | Luigi Fraccaroli |
| Sekretario, kasisto | Tina Raciti |
| Kongresejestro | Francesco Amerio |
| Artaj aranĝoj | Paola Nigrelli |
| Ekskursoj | Alessandro Amerio |
| Infana kongreseto | Daniele Pesce |
| Sociaj retejoj, volontuloj | Debora Rossetti |
| Loĝiga servo, giĉetoj | Alessandro Perna |
| Kongresa Kuriero | Pier Luigi Cinquantini |
| Kontaktoj kun lokaj aŭtoritatoj | Giuseppe Di Donfrancesco |

***

| | |
|---|---|
| Reĝisoro de la Kongresa Temo | Thomas Bormann |
| Rektoro de IKU | prof. Fabrizio Pennacchietti |
| Vicrektoro | prof. Davide Astori |

# 108-a Universala Kongreso de Esperanto

# DUA BULTENO

KONGRESA TEMO

**Enmigrado - kunfluo de homaj valoroj**

TORINO, 29 julio - 5 aŭgusto 2023

# Bonvenon al la kongreslando

**Dokumentoj, vizoj**

Ĉiu vizitanto devas havi validan identigilon, kaj tiuj de landoj ekster la Ŝengenareo devas havi pasporton validan minimume tri monatojn post la forirdato, koncernajn vizon kaj asekurojn, samkiel revenbileton. Bonvolu noti, ke la reguloj pri vizdonado malsamas laŭ landoj kaj ke ili ofte ŝanĝiĝas. La kongresanoj mem devas zorgi pri akiro de vizoj. Bonvolu konscii, ke nek la CO nek LKK povas influi la decidojn de la konsulejoj.

Ĉiu kongresano povas elŝuti la oficialan konfirmon (invitilon) de sia aliĝo uzante la mendilon. Ĝi devas sufiĉi por pruvi la kongresanecon al la vizdona instanco. Al nealiĝintoj oni ne povas sendi invitleteron nek aliajn konfirmaĵojn. Bv. noti, ke la invitilo povas teksti nur por la periodo de la oficiala kongresdaŭro. Se vi bezonas pli longan restadon, tion vi devas aranĝi private. Se vi mendis loĝadon pere de UEA, oni povas sendi, se necese kaj laŭ peto, konfirmon pri pagitaj servoj.

**Eniro en Italion**

Ĉe la paĝaro https://vistoperitalia.esteri.it/ troveblas la informoj por eniri Italion el la diversaj landoj kaj ankaŭ la necesan formularon en kvin malsamaj lingvoj. Se oni ricevas la Ŝengen-vizon, oni povas libere cirkuli en la aliaj Ŝengen-ŝtatoj.

**Kovim-19**

Ekde la 1-a de junio 2022 ne plu estas necese, por eniri Italion, montri la Verdan karton, aŭ similan atestilon. En Italio restas iuj sekurecaj devoj, kiel la utiligo de la maskoj en iuj klare difinitaj situacioj. Kompreneble la situacio povas varii kun la tempopaso, kaj estos nia zorgo informi pri eventualaj ŝanĝoj.

**Asekuroj**

Bv. nepre akiri vojaĝan asekuron, kiu kovras, krom la nuligon de la vojaĝo, ankaŭ KOVIM-rilatajn kostojn (ekz. hotelon), eventualajn santraktadojn kaj repagojn kaze de akcidentoj. UEA ne respondecas pri asekuro de kongresanoj.

**Alveno al Torino kaj al la kongresejo**

Estas konsilinde unue veturi al la elektita hotelo, deponi la valizojn, kaj poste de tie atingi la kongresejon. Se tamen vi unue iros al la kongresejo, sube vi trovos utilajn informojn.

**Aviadile**. La internacia flughaveno de Torino Caselle (TRN) troviĝas je 18,6 km de la kongresejo, *Politecnico, corso Duca degli Abruzzi 24*. Al la urbo eblas iri buse aŭ taksie/aŭtomobile. Per taksio la veturo ĝis la kongresejo daŭras ĉirkaŭ 45/50 minutojn; per buso la veturo kostas 7,50 eŭrojn kaj daŭras preskaŭ horon. La busoj ekveturas kelkfoje hore. La busbileton eblas aĉeti el aŭtomatoj en la flughaveno, kontante aŭ per bankokartoj. Eblas aĉeti la bileton ankaŭ en la buso, sed la kosto estos 8,50 eŭrojn. La haltejo por atingi la kongresejon estas Porta Susa, de kie oni devas utiligi metroon ĝis la haltejo Vinzaglio, aŭ buson 10 ĝis Politecnico.

Eblas ankaŭ alteriĝi en Milano Malpensa kaj Milano Orio al Serio, de kie estas rektaj busoj al Torino Porta Susa.

**Trajne**. Torino havas du ĉefajn stacidomojn: *Porta Susa* kaj *Porta Nuova*. De *Porta Susa* vidu informojn ĉe alveno aviadile. De *Porta Nuova* utiligu buson 33, aŭ 58 aŭ 58/ ĝis *Politecnico corso Duca degli Abruzzi*.

**Aŭte**. Pluraj hoteloj havas pagendajn parkejojn. Ĉe Politekniko la parkado estas pagenda, escepte de dimanĉo.

# La kongresejo

La kongreso okazos en la Politeknika Universitato de Torino - universitato kun pli ol 160 jaroj da historio, rigardanta al estonto, kaj rekonata kiel unu el la ĉefaj teknikaj universitatoj en Eŭropo, kun ĉirkaŭ 36 000 studentoj. Publika universitato, kiu forte kredas je la kunpartigo kun la socio de la gravaj rezultoj akiritaj per esploro kaj je valorigo de kulturaj aktivaĵoj. La adreso estas:

**Politecnico di Torino**
**Corso Duca degli Abruzzi 24**
**10129 Torino**

Por kongresrilataj aferoj bv. skribi nur al kongresoj@co.uea.org




# Utilaj informoj pri Italio, Piemonto kaj Torino

**Situo**

Italio estas lando en suda Eŭropo, najbara de Francio, Svislando, Aŭstrio kaj Slovenio. Ĝi estas membro de Eŭropa Unio ekde 1958 kaj apartenas al la Ŝengena zono.

Italio havas ĉirkaŭ 60 milionojn da loĝantoj, kaj grandas ĉirkaŭ 300-mil $km^2$. Ĝia ĉefurbo estas Romo.

**Lingvoj**

Krom la itala, estas agnoskitaj kiel oficialaj lingvoj en difinitaj regionoj, la franca, la germana, la ladina kaj la slovena.

**Klimato**

Averaĝaj temperaturoj en julio kaj aŭgusto 23°C – 33°C. En tiu periodo la vetero estas, plejofte, suna kaj iom humida. Pluvoj maloftas.

**Loka tempo**

UTC + 02h00 (somere).

**Mono**

La oficiala monunuo estas la eŭro, dividita en 100 cendoj. Moneroj: 1, 2, 5, 10, 20, 50 cendoj, 1 kaj 2 eŭroj. Monbiletoj: 5, 10, 20, 50, 100, 200, 500 eŭroj. Ĉiuj hoteloj, restoracioj, vendejoj (krom la malgrandaj) akceptas kreditkartojn (Visa kaj Mastercard estas la plej uzataj) kaj eŭropajn debetkartojn (ekz. Maestro). Monŝanĝado okazas laŭ reguloj de libera merkato: aŭ kun fiksa servo-sumo je ordinara kurzo, aŭ sen fiksa servo-sumo sed je iom pli alta kurzo (kio konsilindas nur por ŝanĝado de etaj sumoj).

**Trinkakvo**

La kranakvo estas bonkvalita kaj trinkebla, se oni ne atentigas pri la malo (netrinkebla akvo: *"acqua non potabile"*). En vendejoj eblas aĉeti mineralan akvon sengasan ("naturale") kaj kungasan ("frizzante").

**Elektro**

La elektra tensio estas 220-volta. La elektringoj povas esti de 3 tipoj - **F** ("Schuko"), **C** ("Europlug"), kiuj estas la plej disvastiĝintaj en Eŭropo, aŭ **L**, kiu havas iom malpli vastajn truojn.

TIPO F

TIPO C

TIPO L


**Telefonado**

Prefikso por telefoni de eksterlando al Italio: +39, sekvata de kompleta telefonnumero, inkluzive de la nulo de la regiona kodo; prefikso por telefoni de Italio al eksterlando: 00.

**Medikamentoj**

Se vi uzas preskribitan medikamenton, bonvolu kunporti kuracistan recepton, aŭ la folieton kiu akompanas la medikamenton kaj entenas ĝian kemian priskribon / nomon. Apotekoj funkcias 24 horojn tagnokte laŭ aparta alternado. Informoj haveblas ĉe la informa budo de la kongresejo.

**Sanservo**

Eksterlandanoj havu taŭgan konfirmilon pri sanasekuro. LKK kaj UEA ne respondecas pri asekuro de kongresanoj.

**Trinkejoj**

La prezoj varias depende ĉu oni trinkas stare aŭ side. Tre ofte (kaj laŭleĝe) la prezo por sidantoj estas 100% pli ol por starantoj (en luksaj trinkejoj la krompezo povas esti eĉ pli alta). En ĉiu trinkejo (plejofte ĉe la kaso) pendas prezotabulo en kiu la prezoj de ĉio aĉetebla estas indikitaj en du paralelaj kolumnoj plejofte titolitaj, respektive: *Al banco*, t.e. ĉe la trinkstarejo, kaj *Al tavolo*, t.e. ĉetable. En restoracioj kutime estas aldonata "*coperto*" - popersona kotizo, kiu ĉiam estas menciita en la menuo (kutime 2€).

**Trinkmono**

Ĝi estas aprezata, sed ne deviga.

**Enurba trafiko**

La hoteloj plejparte estas ne tro foraj de la kongresejo. Por la urbaj transportiloj biletoj aĉeteblas ĉe aŭtomataj giĉetoj ĉe iuj haltejoj kaj ĉe tabak- kaj ĵurnal-vendejoj. Ekzistas diverstipaj/diverskostaj biletoj. Informoj haveblas ĉe la informa budo en la kongresejo.

Por mendi taksion, eblas voki +390115737 aŭ uzi la poŝtelefonan aplikaĵon Uber. Krome, en la urbo estas multaj lokoj por lui biciklojn kaj elektrajn skutilojn.




**Parkado de aŭtoj**

En la urbocentro ne eblas senpaga parkado. Pagendaj parklokoj estas markitaj per blua koloro. Kelkaj hoteloj disponas je pagenda garaĝo.

**Sekureco**

Konsilindas ordinara singardemo kontraŭ poŝ- kaj mansak-ŝteloj k.s. kiel en ĉiuj grandaj urboj. Ĉiuj forlasitaj (forgesitaj) sakoj, mansakoj, valizoj ktp. estos forportitaj de la polico pro sekureckialoj. La urĝa telefonnumero (polico, fajrobrigado, medicina helpo) estas 112.

**Vendohoroj**

La plej multaj grandaj vendejoj kaj magazenoj funkcias de la 9:00 ĝis la 20:00, ankaŭ sabate kaj dimanĉe. Etaj vendejoj, aparte por turistoj, restas malfermaj ĝis la 22:00 kaj ofte ankaŭ dimanĉe.

# Paroligaj kursoj kun edukado.net

La retejo https://edukado.net/ denove gvidos 2 paralelajn paroligajn kursojn — dufoje tage dum 4 tagoj.

La lecionoj de la 1-a grupo celas komencantojn kaj komencintojn (A1, A2), kiuj havos sinsekvajn 8 lecionojn. Dum la kurso ni uzos la libreton *Poŝamiko*. Akiru ĝin en la libroservo aŭ dum la unua leciono ĉe la kursgvidanto. La ĉeestintoj de ĉiuj 8 partoj ricevos fine atestilon pri la partopreno. Observantoj bonvenas.

Por la meznivelaj (B1, B2) parolantoj de Esperanto estos same ok sesioj, sed laŭtage la sinsekvaj aranĝoj estos ripetoj, do, sufiĉas partopreni tage nur unu lecionon.

La kursojn gvidos Katalin Kováts kaj Sylvain Lelarge. Antaŭa aliĝo al la lecionoj ne necesas.

# KER-ekzamenoj de UEA je kvar niveloj

UEA denove okazigas dum la kongreso ekzamenojn, bazitajn sur la Komuna Eŭropa Referenckadro. Estos ekzamenoj je la konataj niveloj B1, B2, C1 kaj C2.

Ni atentigas vin ke C2-ekzameno povos okazi nur se aliĝos minimume 20 kandidatoj. Ĉe la aliĝo vi povas vidi la aktualan situacion kaj la ŝancojn.

Je ĉiu nivelo okazos skribaj kaj parolaj ekzamenpartoj. Ĉi-lastaj konsistas el aŭdkomprenaj taskoj kaj antaŭkomisionaj buŝaj ekzamenoj (intervjuoj). La priskribo de la enhavo kaj la postularo pri la unuopaj ekzamenniveloj konsulteblas en la ekzamenpaĝo de https://edukado.net/ekzamenoj/ker.

La ĉefa ekzamentago estos vendredo, la 4-a de aŭgusto, kiam okazos laŭvice la skribaj kaj aŭdkomprenaj ekzamenoj je ĉiuj niveloj.

La nombro de lokoj por la parolaj intervjuoj dum la kongreso estos limigita, sed eblos trapasi ilin rete, pere de Zoom je unu monato ankaŭ antaŭ kaj post la kongreso.

Fruaj aliĝintoj havos pli da ebloj elekti sian ekzamentempon.

Interesiĝantoj vizitu la specialan paĝon de la ekzamenoj en TORINO.
https://edukado.net/ekzamenoj/ker/uk aŭ informiĝu ĉe la adreso
ker-ekzamenoj@edukado.net.

Aliĝi necesas antaŭ la ekzameno.

La ekzamenkotizoj varias laŭ la landkategorioj de la membrokotizoj de UEA. Pri la pagenda sumo kaj pagmanieroj atendu la fakturon de UEA. Por dumkongresa aliĝo kaj/aŭ pago estos kalkulataj kromkostoj.

En la programo de la Kleriga Lundo Katalin Kováts, gvidanto de la KER-Ekzamena Centro, okazigos informprogramon pri la sesioj, dum kiu eblos vidi specimenojn, ricevi konsilojn kaj starigi demandojn.

# Kongresa temo

**Enmigrado - kunfluo de homaj valoroj**


En ĉiuj epokoj de la historio homoj migris de unu regiono al alia, de unu lando al alia – ĉu por trovi lokon por kulturi teron kaj nutri sian familion, ĉu – en la nuntempo – por studi aŭ labori. Homoj kun diversaj kulturaj fonoj, kun diversaj gepatraj lingvoj kunvivas en sama loko, tiel homaj valoroj kunfluas kaj kontribuas al la pluevoluigo de socioj. Migrado estas inspiro, ne nur por la homoj kiuj migras, sed ankaŭ por tiuj kiuj renkontas la migranton kiel novan najbaron.

Multaj esperantistoj riĉigis siajn vivojn per propra migrada sperto. Jam la eklerno de la internacia lingvo Esperanto estas unua paŝo por esti preta renkonti homojn kun alia gepatra lingvo, alia kultura fono. Kelkaj esperantistoj elektis vivi en aliaj landoj kaj mem fariĝi parto de la socio kaj kulturo de la nova lando.

Samtempe, pli kaj pli ofte homoj estas devigataj forlasi sian hejmon. Ili fariĝas migrantoj kontraŭvole – pro milito, pro mizero, pro danĝero. Ili ne povas resti en siaj hejmlokoj, sed devas fuĝi. En la jaro 2022 la nombro de rifuĝintoj tutmonde unuafoje superis cent milionojn, laŭ la statistiko de la UN-suborganizo por rifuĝintoj, UNHCR.

La urbo Torino estas taŭga gastiganto por tiu Kongresa temo – en Torinon enmigris miloj da homoj por labori en la industriaj produktejoj. Ni lernos pri la situacio de enmigrantoj en Torino kaj en Italio en la pasinteco kaj en la nuntempo. Ni studos la fenomenon de migrado en aliaj mondopartoj. Ni krome analizos la temon el pli vasta, naturscienca vidpunkto: migrado ĉiam estis fonto de evoluo kaj progreso: migrado de plantoj, de bestoj, de homoj. Kaj fine, ni intencas analizi kiun rolon ludu la Esperanto-movado por solvi problemojn estiĝantajn pro migrado aŭ por migrantoj.

Reĝisoro de la Kongresa temo estas Thomas Bormann, ĵurnalisto el Germanio, esperantisto depost la 1970-aj jaroj. Bormann vivis dum pluraj jaroj en Turkio kaj en Grekio por raporti el tiuj landoj por la germana radio-reto “ARD”. Ofta temo por li estis la situacio de la multaj rifuĝantoj kiuj trapasis aŭ restis en Turkio, respektive Grekio. Por kontakti la reĝisoron pri la kongresa temo, skribu al KongresaTemo@groups.io – interesatoj ankaŭ povas aktive partopreni la diskutliston.



# Provizora programo

Ĉi tie aperas nur la plej gravaj programeroj. La Estraro de UEA rezervas al si la rajton fari ŝanĝojn.

| | |
|---|---|
| **29-a de julio, sabato:** | Malfermo de la kongresejo je 9h00. Registriĝo. Disdonado de dokumentoj. Komitato de UEA. Unuafojaj Kongresanoj. Libroservo. Movada Foiro. Giĉetoj funkcias ĝis 18h00. |
| **30-a de julio, dimanĉo:** | Solena Inaŭguro (10h00). Libroservo. Kongresa Temo. Inaŭguro de IKU/AIS. Ekumena Diservo. Nacia Vespero. |
| **31-a de julio, lundo:** | Libroservo. IKU- prelegoj. E-kursoj. Kleriga Lundo. Itala Eksprese. Societo Zamenhof. Bankedo. Kongresa Balo. |
| **1-a de aŭgusto, mardo:** | Libroservo. E-kursoj. Tago de Lernado. IKU-prelegoj. Kongresa Temo. Estraro respondas. Itala Eksprese. Koncerto/Teatraĵo. |
| **2-a de aŭgusto, merkredo:** | Tuttagaj ekskursoj. (Kongresejo fermita.) |
| **3-a de aŭgusto, ĵaŭdo:** | Libroservo. Libroj de la Jaro. IKU-prelegoj. Kongresa Temo. Esperantologia Konferenco. Belartaj Konkursoj. Itala Eksprese. E-kursoj. Koncerto / Teatraĵo. |
| **4-a de aŭgusto, vendredo:** | Libroservo. Komitato de UEA. IKU-prelegoj. KER-ekzamenoj. Faka Forumo. Aŭkcio. Venontaj UK-oj. Internacia Arta Vespero. |
| **5-a de aŭgusto, sabato:** | Solena Fermo (10h00). Libroservo. Fermo de la kongresejo (14h00). |



# Ĝeneralaj kondiĉoj de mendado

La kondiĉoj de mendoj kaj malmendoj estas priskribitaj en la reta mendilo kaj en la Dua Bulteno. Mendante, ĉiu kongresano akceptas tiujn kondiĉojn. Bonvolu nepre legi ilin antaŭ ol plenigi kaj sendi vian mendilon.

**Bazaj informoj**

UK akceptas mendojn nur de registritaj kongresanoj. Registrita kongresano estas konsiderata tiu, kiu ricevis konfirmon pri sia aliĝo kun la kongresa numero. Kongresanoj indikas siajn personajn informojn, kaj UK ne respondecas pri eventualaj mismendoj kaŭzitaj pro manko aŭ malĝusteco de tiuj informoj. UK devigas sin liveri ĉiujn servojn laŭ la priskriboj en la Dua Bulteno kaj ne respondecas pri (ne)plenumo de nemenciitaj servoj.

**Loĝado**

Kiel unuan loĝdaton oni kalkulas la daton de la alveno al la loĝejo (ekloĝo); se oni venas iam post noktomezo, kalkuliĝas la dato de la antaŭa tago. Kiel lastan daton oni kalkulas la daton de la foriro de la loĝejo, do, la daton de la lasta mateno en ĝi.

Principe, eblas okupi ĉambrojn ekde la 15h00 de la mendita dato kaj endas forlasi la ĉambrojn ĝis la 12h00 de la lasta tago. Se vi ne okupos ĉambron dum la unua mendita tago, oni nuligos la rezervon kaj vi perdos la plenan pagitan sumon por la tuta restadperiodo.

**Dulitaj ĉambroj/hazarda kunloĝigo**

La loĝiga servo ne povas aranĝi hazardan kunloĝigon de nekonatoj en hoteloj, pro kio du- kaj plurlitajn ĉambrojn ni disponigas nur al homoj, kiuj anticipe interkonsentis pri kunloĝado kaj menciis tion sur siaj mendiloj.

Oni ĉiam fakturas la koston de plena ĉambro, eĉ se la kunloĝanto(j) forestas dum iu(j) tago(j). Por faciligi la trovon de kunloĝanto al homoj, kiuj nepre volas loĝi en dulitaj (aŭ plurlitaj) ĉambroj sed ne havas kunloĝanton, ni rekomendas uzi la telegraman grupon de UK: https://uk.telegramo.org/.

**Frueco de la mendo kaj alternativoj**

Ĉar la mendeblaj litlokoj ne estas senlimaj, kaj precipe ĉar la kongreso okazas dum la turisma sezono, gravas mendi kiel eble plej frue. Tial gravas, ke ĉe ĉiu mendo oni nepre menciu ankaŭ alternativajn loĝvariantojn, kiun la Kongresa Fako rezervos, se ne eblas plenumi la originan mendon. El la reta mendilo eblas scii, kiuj loĝejoj ankoraŭ havas liberajn lokojn.

**Ekskursoj**

Ĉiuj ekskursoj startas de la kongresejo, krom se aliloke indikite (ĉu en la ekskursa priskribo, ĉu sur la ekskursa bileto). Bonvolu veni 15 minutojn antaŭ la indikita starthoro de la ekskurso. Ĉiujn ekskursojn akompanos Esperantlingvaj gvidantoj.



Kun la kongresaj dokumentoj ĉiuj mendintoj ricevos koverton kun la biletoj de la menditaj ekskursoj kun la bazaj informoj pri ili (dato, horo, buso), kiuj eventuale povos malsami ol tiuj, presitaj en la Dua Bulteno. Okaze de malsameco validas la informoj presitaj sur la biletoj.

Ne forgesu preni ŝirmilon kontraŭ suno, vento kaj eventuale pluvo. Bv. noti, ke kelkaj ekskursoj povas esti netaŭgaj por homoj kun marŝproblemoj; la priskribo de la ekskurso kutime mencias tion.

**Ekskursaj kondiĉoj**

Ĉar la ekskursoj dependas de minimumo da partoprenantoj, la organizantoj rezervas al si la rajton eventuale nuligi ilin aŭ altigi la prezojn de iuj el ili. En tiuj okazoj ni klopodos averti vin kiel eble plej frue antaŭ la kongreso, por ke eblu ŝanĝi aŭ nuligi la ekskurso(j)n.

**Limdatoj**

La limdato por mendi loĝadon kaj antaŭkaj postkongresajn ekskursojn estas la 15-a de majo 2023. Mendojn post tiu dato oni plenumos nur escepte kaj nepre kontraŭ krompago de 40 eŭroj. La ceterajn ekskursojn kaj la bankedon eblos mendi ĝis la elĉerpiĝo de liberaj lokoj.

**Pago kaj konfirmo de mendoj**

La mendojn ni traktos nur post la ricevo de la koncerna pago. Post la trakto vi ricevas la konfirman mesaĝon de la Kongresa Fako.

Kiel daton de la mendoricevo ni konsideras la daton de la ricevo de la pago. Se la mendo ne estas plene pagita, bv. tuj pagi la diferencon. Se la ŝuldo estas malpli ol 20€, vi povas pagi ĝin dum la UK.

**Malmendoj**

Malmendoj devas esti skribaj (al kongresoj@co.uea.org aŭ per redakto de la reta mendilo). Ĉe malmendoj faritaj antaŭ la 15-a de majo oni rericevos la tutan mendosumon minus 15€ por la administraj kostoj. Ekde la 15-a de majo ne eblos repagoj.

**Reklamacioj kaj repagoj**

Ĉiuj reklamacioj kaj postuloj pri la repagoj (ekz. pro neliveritaj aŭ neuzitaj servoj, nepartopreno k.s.) devas esti faritaj skribe al kongresoj@co.uea.org kun la titolo "Reklamacio" antaŭ la fino de aŭgusto 2023. Se eblas, la reklamacion oni faru jam dum la UK.

Atente traleginte la priskribojn bv. elekti la servon kaj plenigi la retan mendilon.

**KIEL MENDI?**

Ĉiu kongresano ricevas al sia retpoŝtkesto **personan ligilon** por la reta mendilo. Uzante ĝin, eblas ankaŭ ŝanĝi sian mendon poste. Ne hezitu kontakti la Kongresan Fakon per kongresoj@co.uea.org okaze de ajnaj demandoj.



# Hoteloj

Ĉiuj prezoj estas en eŭroj (€) por unu persono por unu nokto; p.p. = por persono.

**H1 NH TORINO CENTRO** ****
(9 min. piede aŭ 5 min. per publika transporto)

**0,7 km**

*Corso Vittorio Emanuele II 104*

La hotelo situas inter la du fervojaj stacidomoj, Porta Susa (350 m) kaj Porta Nuova (1 km), kaj estas ankaŭ je piedirdistanco de la ĉefaj turismaj vidindaĵoj kaj la kongresejo.

Tuj apud la hotelo troviĝas la haltejo de metroo "Vinzaglio" kaj ankaŭ de tramoj kaj busoj, kiuj ebligas facile atingi ĉiun kvartalon de la urbo.

NH Torino Centro proponas klimatizitajn, komfortajn, ĵus renovigitajn ĉambrojn kun fridujeto, televidilo kaj senpaga retkonekto. La restoracio de la hotelo servas per abunda bufeda matenmanĝo.

En la hotelo troviĝas ankaŭ kafejo kaj restoracio. Parkejo ne estas inkluzivita en la prezo.

Ni rekomendas ĝin al personoj kiuj ŝatus komforte loĝi proksime de la kongresejo kaj de la vidindaĵoj de la urbo.

- Unupersona ĉambro: 127 €
- Dupersona ĉambro: 76 € p.p.

**H2 HOTEL CONCORD** ****
(24 min. piede aŭ 12 min. per publika transporto)

**1,9 km**

*Via Giuseppe Luigi Lagrange 47*

Ĝi situas 100m for de la stacidomo Porta Nuova kaj tuj ĉe la urbocentro kaj butikstratoj. La hotelo disponas je renovigitaj, klimatizitaj ĉambroj kiuj enhavas televidilon, fridujeton kaj banĉambron kun ĉiuj necesaĵoj. La bufeda matenmanĝo proponas tre buntan manĝelekton.

Parkejo ne haveblas en la hotelo, sed proksime troviĝas pagendaj publikaj parklokoj kaj garaĝoj.

Ni rekomendas ĝin al personoj kiuj ŝatus loĝi tre proksime de la urbocentro kaj aĉetstratoj.

- Unupersona ĉambro: 114 €
- Dupersona ĉambro: 63 € p.p.

**H3 BEST WESTERN EXECUTIVE HOTEL AND SUITES** ****
(22 min. piede aŭ 13 min. per publika transporto)

**1,7 km**

*Via Nizza 28*

La hotelo troviĝas en tre vigla kvartalo proksime de la urbocentro, trajnstacidomo Porta Nuova kaj vizitinda parko Parco del Valentino.

La hotelo proponas tre komfortajn ĉambrojn kun klimatizilo, televidilo, fridujeto, retkonekto kaj servas per varia bufeda matenmanĝo. Krome, estas sporta ekzercejo kaj ripoziga areo kun naĝejo sur la tegmento. Aparte pagenda parkejo troviĝas en subtera garaĝo de la hotelo.

Ni rekomendas ĝin al personoj, kiuj ŝatus loĝi proksime de la urbocentro kaj havi aliron al la surtegmenta naĝejo. Aparte rekomendindas al trajnŝatantoj pro la proksima trajnstacidomo.

- Unupersona ĉambro: 120 €
- Dupersona ĉambro: 67 € p.p.

**H4 BQ Politecnico** ****
(10 min. piede aŭ 8 min.
per publika transporto)

**0,8 km**

*Corso Peschiera 117*

Ĉambroj havas klimatizadon, sekurŝrankon, fridujeton, televidilon, akvoboligilon kaj harsekigilon. La hotelo estis renovigita en 2020. La prezo inkluzivas bufedan matenmanĝon, interreton kaj sportan ekzercejon. Eblas parki la aŭton en negranda privata parkejo kontraŭpage, aŭ ĉe la strato senpage.

Ni ĉefe rekomendas ĝin al personoj, kiuj venas per aŭto.

- Unupersona ĉambro: 112 €
- Dupersona ĉambro: 65 € p.p

**STUDENTHEJMOJ:**

**H5 CAMPUS SANPAOLO** ***
(25 min. piede aŭ 19 min.
per publika transporto)

**2 km**

*Via Caraglio 97*

Tiu ĉi luksa studenthejmo malfermiĝis en 2015, kaj proponas tre komfortajn sonizolitajn unu- kaj dulitajn ĉambrojn kun klimatizilo, interreto, televidilo, sekurŝranketo, privata banĉambro, harsekigilo.

La prezo inkluzivas bufedan matenmanĝon kun bakaĵoj kaj varmaj trinkaĵoj, krome estas ankaŭ vendmaŝinoj kun diversaj manĝetoj kaj kuirejo, kie vi povas kuiri memstare. Krontraŭ eta krompago eblas uzi lavmaŝinojn. La hotelo ofertas 24-horan akceptejon, komunan salonon kaj parkadon en apuda strato. Tuj apude troviĝas granda superbazaro.

Ni rekomendas tiun ĉi hotelon al personoj, kiuj ŝatus ĝui avantaĝojn de studenthejmo (kiel eblo uzi kuirejon, uzi malmultekostan vestaĵlavejon), sed samtempe havi komfortan restadon en modernaj klimatizitaj ĉambroj je nivelo de 3-stela hotelo.

- Unupersona ĉambro: 83 €
- Dupersona ĉambro: 51 € p.p.

**H6 Verdi**
(38 min. piede aŭ 22 min.
per publika transporto)

**3 km**

*Via Verdi 15*

Tiu ĉi freŝrenovigita studenthejmo troviĝas en la urbocentro proksime al Mole Antonelliana (fama turo kiu troviĝas ankaŭ en la emblemo de tiu ĉi UK). Ĝi proponas 1- kaj 2-litajn ĉambrojn kun fridujo, interreto. Ĉiuj du unupersonaj ĉambroj kundividas privatan banĉambron kun duŝejo. Dupersona ĉambro havas privatan banĉambron. En la studenthejmo oni trovos komunajn kuirejojn, vendmaŝinon kun diversaj manĝetoj kaj trinkaĵoj, komunajn salonojn kun televidilo, kaj vestaĵlavejon (kontraŭ 1,50€). De la studenthejma teraso estas belega vido al la turo Mole Antonelliana.

Tiu ĉi studenthejmo ne havas klimatizilon kaj ne estas servo per matenmanĝo.

Ni rekomendas tiun ĉi studenthejmon al personoj, kiuj ŝatus loĝi en la urbocentro, havi eblon kuiri mem kaj havi aliron al malmultekosta vestaĵlavejo.

- Unupersona ĉambro: 31 €
- Dupersona ĉambro: 26 € p.p

**H7 San Liborio**
(32 min. piede aŭ 20 min. per
publika transporto)

**2,5 km**

*Via San Domenico 10*

La studenthejmo troviĝas en la urbocentro inter stratetoj kun multaj restoracioj.

La unupersonaj ĉambroj enhavas etan kuirangulon kun fornelo (sen potoj kaj manĝilaro) kaj fridujeto kaj privatan banĉambron kun duŝejo. La dupersonaj ĉambroj havas privatan banĉambron kun fridujeto, sed la komunaj kuirejoj (kun fornelo sed sen potoj aŭ manĝilaro) troviĝas ekster la ĉambro. Aldone estas interreto, en la studenthejmo uzeblas ankaŭ vendmaŝino kun manĝetoj kaj trinkaĵoj kaj vestaĵlavejo (1,50 EUR).

Tiu ĉi studenthejmo ne havas klimatizilon kaj ne estas servo per matenmanĝo.

Ni rekomendas tiun ĉi studenthejmon al personoj, kiuj ŝatus loĝi en la urbocentro, havi eblon kuiri mem kaj havi aliron al malmultekosta vestaĵlavejo.

- Unupersona ĉambro: 31 €
- Dupersona ĉambro: 26 €

### H8 **Borsellino**

(15 min. piede)

**1,2 km**

*Via Paolo Borsellino 42*

La studenthejmo troviĝas proksime al la kongresejo. Ĝi proponas ĉambrojn kun LAN-kabla interreto, fridujo, banĉambro kun duŝejo. En la studenthejmo vi trovos komunajn salonojn por renkontiĝi, komunajn kuirejetojn (kun fornelo sed sen potoj aŭ manĝilaro), vendmaŝinon kun diversaj manĝetoj kaj trinkaĵoj, kontraŭpagan vestaĵlavejon (1,5€) kaj aparte pagendan parkejon.

Tiu ĉi studenthejmo ne havas klimatizilon kaj ne estas servo per matenmanĝo.

Ni rekomendas tiun ĉi studenthejmon al personoj, kiuj ŝatus loĝi proskime al la kongresejo, kuiri mem kaj povi renkontiĝi kun la aliaj en komunaj salonoj.

- Unupersona ĉambro: 31 €
- Dupersona ĉambro: 26 € p.p.

### H9 **Lingotto**

(25 min. per metroo)

**3,9 km**

*Via Nizza 230, rampa nord c/o 8 Gallery*

La studenthejmo estas bone konektita kun la kongresejo per metroo. Ĝi proponas 3-personajn ĉambrojn kun interreto, banĉambro kaj kuirangulo (kun fridujo kaj fornelo, sed sen potoj aŭ manĝilaro). En la studenthejmo vi trovos komunajn salonojn, vendmaŝinon kun diversaj manĝetoj kaj trinkaĵoj kaj kontraŭpagan vestaĵlavejon. Ĝi troviĝas en granda konstruaĵo kune kun aliaj hoteloj, diversaj vendejoj kaj granda parkejo (15€/tago).

Tiu ĉi studenthejmo ne havas klimatizilon kaj ne estas servo per matenmanĝo.

Ni rekomendas ĝin al personoj, kiuj planas kuiri mem, ŝatus renkontiĝi kun la aliaj en komunaj salonoj kaj al tiuj, por kiuj taŭgas vojaĝi per metroo aŭ propra aŭto.

- Loko en 3-persona ĉambro por 1 nokto: 23 € p.p.

**Speciala oferto por studentoj!**

Se vi estas studento ĝis- 26-jara kaj loĝos en studenthejmo H6 - Verdi, H7- San Liborio, H8 - Borsellino aŭ H9 - Lingotto minimume dum 7 noktoj, vi ricevos repagon de 1 tranokto (23, 26 aŭ 31 €)!

Bv. informi pri via studenteco en komentoj de la mendilo kaj sendi foton de via studentkarto al kongresoj@co.uea.org plej malfrue ĝis fino de junio.

# Ekskursoj

## Antaŭkongresaj ekskursoj

Se la sinsekvo de la vizitindaĵoj dum la ekskursoj ne povos okazi laŭ la priskribo, alternativoj estos proponataj. Pri la eventuala nuligo de programero(j) pro kialoj ekster la homa rego, ekz. katastrofo, UEA ne respondecos. La partoprenantoj devas memstare atingi la lokojn de la komenco de la antaŭkongresaj ekskursoj kaj memstare vojaĝi al la (flug)haveno por foriri hejmen, fine de la postkongresaj ekskursoj.

La ĉiĉeronoj (lokaj esperantistoj) pretos helpi per sugestoj pri taŭgaj transportoj.

Ĉiu partoprenanto respondecas pri la informo al UEA de siaj nomoj kiel enskribitaj en la pasporto (oni povas esti rifuzita en la ekskursoj se la nomo sur la mendolisto ne kongruas kun tiu en la pasporto).

La prezo inkluzivas:

- A1: restadon en komfortaj 4-stelaj hoteloj kun matenmanĝoj kaj vespermanĝoj kaj turisman imposton
- tagmanĝojn
- transporton per turisma buso kaj publika transporto
- bezonatajn enirbiletojn
- Esperantan gvidanton

La prezo ne inkluzivas:

- A1: hotelajn ekstraĵojn (ekz. trinkaĵojn en la hotelĉambra fridujeto, telefonvokojn)
- A2: restadon en hotelo, matenmanĝojn, vespermanĝojn
- asekuron

### A1 Romo, Sieno, Florenco kaj Pizo

*24-a - 29-a de julio, 6 tagoj / 5 noktoj*

***24.07 Romo.***

Alveno al la hotelo, registriĝo kaj enloĝiĝo. Vespermanĝo en la hotelo kaj tranokto.

***25.07 Vatikana urbo kaj baroka Romo***

Matenmanĝo en la hotelo, renkontiĝo kun la gvidanto en la hotelo mem kaj atingo de la *Piazza San Pietro* per publika transporto por viziti la koron de la Katolika Eklezio. La Vatikana ŝtato estas la sidejo de la Papo kaj en ĝi troviĝas arkitekturaj verkoj unikaj en la mondo, kiel la belega kolonaro de Bernini kaj ĝia impona obelis-



ko, situanta ĝuste en la centro de la placo. Tagmanĝo en restoracio kaj atingo de la urbocentro por gvidata vizito de la baroka Romo. La nemaltrafeblaj haltoj laŭ la itinero estos *Piazza di Spagna* kun ĝia pitoreska ŝtuparo de *Trinità dei Monti* kaj la *Barcaccia*, fontano de Bernini; la fontano de Trevi, *Piazza Navona* kaj la preĝejo de *Santa Agnese*; la Panteono, iama Romia Templo, nuntempe tombejo de italaj reĝoj kaj de Raffaello Sanzio.

Reveno al la hotelo, vespermanĝo kaj tranokto.

***26.07 Antikva Romo - Geto - Trastevere***

Matenmanĝo en la hotelo, renkontiĝo kun la gvidanto kaj atingo de la antikva parto de Romo per publika transporto. Oni admiros la Koloseon, la plej grandan amfiteatron en la mondo; la arkon de Konstanteno; la Imperiajn Forumojn (arkitekturan komplekson unikan en la mondo, konsistantan el serio da konstruaĵoj kaj monumentaj placoj, konstruitaj dum periodo de proksimume 150 jaroj, inter 46 a.K. kaj 113 p.K.) Poste oni atingos la *Vittoriano*, monumenton dediĉita al Vittorio Emanuele la dua, konstruitan okaze de la 50-jara datreveno de la unuiĝo de Italio en perfekta novklasika stilo kaj kiu enhavas la *Altare della Patria* (patruja altaro). Tagmanĝo en restoracio, antaŭ ol daŭrigi tra la Geto kaj *Trastevere*, karakteriza kaj originala kvartalo kun bohemeca etoso. Ĝi estas konata pro tradicia kaj noviga kuirarto, bierfarejoj kaj metiobutikoj.

Reveno al la hotelo, vespermanĝo kaj tranokto.

**27.07 - Romo – Sieno – Florenco**

Matenmanĝo frumatene en la hotelo, liberigo de la ĉambroj kaj forveturo al Sieno per turisma buso. Alveno en Sieno kaj gvidata vizito de la urbo, mondfama pro



la *Palio* (ĉevalkonkurso), kun ĝia majesta Katedralo. Tagmanĝo. Transporto al Florenco kun fundamenta halto ĉe la sensacia *Piazzale Michelangelo*, planita en 1869 de la florenca arkitekto Giuseppe Poggi kaj prezentanta belan panoraman vidon de Florenco kaj la rivero Arno.

Reveno al la hotelo, vespermanĝo kaj tranokto.

***28.07 Florenco***

Matenmanĝo en la hotelo, renkontiĝo kun la gvidanto kaj atingo de la historia centro de Florenco. Tuta tago dediĉita al vizitado de la lulilo de la itala Renesanco. La urbo esprimas sian tutan belecon danke al la verkoj de Giotto, Donatello, Michelangelo, Brunelleschi, Botticelli, Leonardo da Vinci. Vizito de la ĉefaj placoj kiel *Piazza del Duomo* kun la impona Baziliko de *Santa Maria del Fiore* kaj ĝia kupolo de Brunelleschi; *Piazza della Signoria* kun *Palazzo Vecchio* kaj la *Loggia dei Lanzi*, kiu enhavas skulptaĵojn kiel, ekzemple, la forrabo de la Sabeninoj de Giambologna. Tre proksime de la placo *della Signoria* troviĝas *Ponte Vecchio*, simbolo de Florenco, kie ankoraŭ troviĝas la plej famaj oraĵistaj butikoj el la urbo. Tagmanĝo. Vizito de la Baziliko de San Lorenzo, kiu entenas la imponajn kapelojn de familio Medici: vizito de la maŭzoleo de la familio, kiu enhavas verkojn de Mikelanĝelo, Buontalenti kaj Nigetti. Reveno al la hotelo, vespermanĝo kaj tranokto.



***29.07 Pizo - Torino***

Matenmanĝo en la hotelo kaj forveturo per turisma buso al Pizo. Renkontiĝo kun la gvidanto en la fama *Piazza dei Miracoli*, monda heredaĵo de Unesko. La tri konstruaĵoj kiuj konsistigas ĝin, simbolas la ĉefajn etapojn en la vivo de ĉiu homo: la Baptisterio, naskiĝo, la Katedralo de Santa Maria Assunta kun la impona klinita sonorilturo, la "Turo de Pizo", la vivo, kaj la *Camposanto* (tombejo) kiu aludas al morto.

Tagmanĝo. Vojaĝo al Torino.

Prezo de la ekskurso:

- en unupersona ĉambro 1650 € p.p.
- en dupersona ĉambro 1350 € p.p.

## A2 Torino

*27-a - 28-a de julio, 2 tagoj, sen tranoktoj*

***27.07 Torina urba piedira vizito kaj reĝaj muzeoj***

Renkontiĝo kun la gvidisto en *Piazza Castello* (placo de la kastelo) je la 9h00 por



la piedira vizito de la urbo. Oni vidos la eksteron de la majesta *Palazzo Madama* kaj *Palazzo Reale*, harmonia unuo kun *Galleria Chiablese* kaj la alo de la Biblioteko (en kies kirasita kelo estas ĵaluze konservata la memportreto de Leonardo da Vinci). Oni eniros la barokan preĝejon de San Lorenzo, kiu estas la reĝa kapelo de la familio Savoia, konsiderata unu el la tricent plej belaj preĝejoj en la mondo (oni aparte rigardos la kupolon). Post tio oni eniros la honorkorton de la Reĝa Palaco kaj oni atingos la Katedralon de San Giovanni por vidi kie estas konservata la plej grava kaj diskutita relikvo en la mondo: la Sankta mortintotuko.

Oni vizitos la proksimajn restaĵojn de la romia teatro kaj la Palatinan pordegon, la antikvan nordan pordegon de aliro al la romia *castrum* (fuorto) "Julia Augusta Taurinorum". Poste oni daŭrigos laŭ la plej eleganta strato en Torino - Via Roma - por atingi la barokan *Piazza San Carlo* kaj *Piazza Carignano*, kie dominas la samnoma konstruaĵo kun sia belega onda fasado, unu el la plej elegantaj lokoj en la urbo. *Piazza Carignano* estas "Risorgimento-koncentriĝo"; la Grafo de Cavour forlasis la Parlamenton por iri ĉiutage al la fama *Ristorante del Cambio* por tagmanĝi. En la liberty-stila Galerio Subalpina, oni rakontos la historion de la *Bicerin*, trinkaĵo farita de laktokremo, kafo kaj piemonta avela ĉokolado. Poste oni promenos al la *Mole Antonelliana*, la simbolo de la urbo kaj sidejo de la Kinoarta Muzeo.

Tagmanĝo en restoracio.

Posttagmeze - gvidata vizito de la reĝaj muzeoj (nobela etaĝo, reĝa armilejo, kapelo de la sankta tuko kaj la ĝardenoj).

La nobela etaĝo bonvenigos la ekskursantojn, kaj la gvidata vizito iros tra akceptosalonoj, ĉinaj kabinetoj kaj deksepa-jarcentaj buduaroj. Mirinda estas la rigardo, kiun donos la Galerio Beaumont, kie videblas armiloj kaj kirasoj kolektitaj de la reĝo Carlo Alberto kaj per lia volo montreblaj al la ĝenerala publiko de la deknaŭa jarcento. Ne maltrafindaj krome estas la Statuto-Ĉambro, la Galerio Daniel Sayter kaj la prestiĝa manĝoĉambro, kaj ankaŭ la Reĝa Armilejo.

La grupo estos akompanata por malkovri la Kapelon de la Mortintotuko, unu spacon perfekte enmetitan inter la Reĝa Palaco kaj la Katedralo de San Giovanni; ĉiu estos libera malkovri ĝian simbolan, esoteran kaj religian signifojn.

***28.07 Laŭrivera promenado kaj eksterurba rondiro***

Oni renkontiĝos kun la gvidanto antaŭ la trajnstacidomo *Porta Nuova* kaj per publika transporto oni iros ĝis la *Parco del Valentino*, kiu laŭiras la riveron Pado kaj ŝuldas sian nomon al la kristana martiro Sankta Valentino. De la torina Arko de Triumfo oni promenos laŭ la rivero por admiri la Kastelon, sidejon de la arkitektura fakultato, kaj la Mezepokan Vilaĝon, perfektan reproduktaĵon konstruitan okaze de la Ĝenerala Ekspozicio de 1884, ĝis la *Fontana dei dodici mesi* (fontano de la dekdu monatoj).



Fine de la promenado la turisma buso portos la ekskursantojn al *Rivodora*, ĉarma vilaĝo situanta sur la torina monteto, por tagmanĝo ekstere sub ombraj ŝirmiloj.

Post la manĝo la buso portos la ekskursantojn al la baziliko de *Superga*, el kies te-



rasoj oni povas admiri la tutan urbon kaj kie oni vizitos la maŭzoleon de *Grande Torino*, urba futbala teamo kiu pereis en aviadilakcidento en 1949.

Plue, ĉiam per buso, oni realproksimiĝos al la urbo, irante al *Villa Della Regina* (vilao de la Reĝino), unu el la multaj nobelaj ejoj de la urbo, lastatempe restaŭrita tre fajne.

Subeniĝante de la monteto, la buso haltos por elbusigi tiujn, kiuj deziros daŭrigi la ekskurson memstare, promenante al la *Monte dei Cappuccini*, kien buso ne povas iri kaj la kruta strato ne estas konsilinda por ĉiuj.

La cetero de la grupo estos reakompanita al la stacidomo *Porta Nuova*.

Prezo de la ekskurso: 179 €

# Postkongresa ekskurso

## P1 Verono - Padovo - Venecio

*6-a - 9-a de aŭgusto, 4 tagoj / 3 noktoj*

**Tiu ĉi ekskurso komenciĝos en Torino la sekvan tagon post la fino de la Kongreso - dimanĉon la 6-an de aŭgusto. Nepras mendi la aldonan tranokton en Torino!**

**La ekskurso finiĝos la 9-an de aŭgusto en Venecio, do necesas plani alhejman vojaĝon de Venecio.**

La prezo inkluzivas:

- restadon en komfortaj 4-stelaj hoteloj kun matenmanĝoj kaj vespermanĝoj
- tagmanĝojn
- transporton per turisma buso kaj rapidtrajno
- bezonatajn enirbiletojn
- Esperantan gvidanton
- turisman imposton

La prezo ne inkluzivas:

- tranokton la 5-an de aŭgusto (antaŭ la komenco de la ekskurso)
- hotelajn ekstraĵojn (ekz. trinkaĵojn en la hotelĉambra fridujeto)
- portadon de pakaĵoj dum kelkcent metroj de la hotelo al la stacidomo en Padovo (mendebla surloke, 5€/objekto)

***6.08 Torino – Verona***

Renkontiĝo de la grupo je la 7h00 kaj foriro per turisma buso al Verono. Komenco de la vizito de la urbo, scenejo de la dramo de Ŝekspiro en la amrakonto inter Romeo kaj Julieta. Oni laŭiros la stratetojn de la urbo, mergite en mezepoka kaj renesanca arkitekturoj inter la historiaj placoj de la urbo kiel *Piazza delle Erbe*, la plej malnova en la urbo, konstruita sur la iama areo de la romia forumo. Oni haltos antaŭ la ĉefaj monumentoj kiel *Ponte Pietra, Arche Scaligere, Piazza dei Signori*, Baziliko de *Sant'Anastasia* kaj la tre fama areno, daŭre uzata por spektakloj kiel operoj kaj baletoj*.

Tagmanĝo en restoracio dum la vizito.

Foriro al Padovo, alveno al la hotelo por vespermanĝo kaj tranokto.

***7.08 Padovo***

Matenmanĝo en la hotelo, renkontiĝo kun la gvidanto kaj komenco de la gvidata vizito de Padovo, konata pro sia universitato kaj fama tra la mondo pro la baziliko dediĉita al ĝia patrono, *Sant'Antonio* (interna vizito de la preĝejo). La urbo estis (laŭlegende

* *Se estas personoj interesataj spekti la koncerton de Placido Domingo la 6-an de aŭgusto, ili urĝe sin anoncu per retpoŝta mesaĝo al* UK2023sekretario@esperanto.it





fondita de la heroo de la greka mitologio Antenore) estis vizitata tra la jarcentoj de elstaruloj kiel Galileo, Giotto kaj Mantegna. Ĝi konservas historian centron kun arkadaj stratoj kaj belaj placoj, kie troviĝas gravaj palacoj kaj viglaj bazaroj. Oni eniros en la *Cappella degli Scrovegni*, nuntempe konsideratan unu el la absolutaj majstraĵoj de monda arto. Por ornami la konstruaĵon, celante loĝigi sin kaj siajn posteulojn postmorte, Enrico Scrovegni vokis du el la plej grandaj tiamaj artistoj: Giovanni Pisano, por krei 3 marmorajn altarstatuojn prezentantajn la Madonon kun Infano inter du diakonoj, kaj Giotto, por krei la bildan ornamon de la mursurfaco. Tagmanĝo dum la vizito.

Alveno al la stacidomo por atingi Venecion per rapidega trajno (daŭro 30 minutojn). Alveno al Venecio *Santa Lucia* en la urbocentro, enloĝiĝo en la hotelo (proksima de la stacidomo), vespermanĝo kaj tranokto.

***8.08 Venecio***

Matenmanĝo en la hotelo, renkontiĝo kun la gvidanto kaj komenco de la gvidata promenado tra la urbo. Fascina lagunurbo, riĉa je historio kaj sekretoj ligitaj al la Casanova familio; oni trapasos stratetojn kaj kanalojn, mergante sin en atmosferon de aliaj epokoj, en unu el la plej belaj kaj romantikaj lokoj en la mondo. Halto ĉe la ĉefaj monumentoj kiel *Piazzale Roma*, baziliko



de *Santa Maria dei Frari*, *Campo San Paolo*, Granda Kanalo kaj *Ponte di Rialto*, *Piazza San Marco* kun la Doĝa Palaco kaj baziliko *San Marco*. Oni eniros por admiri verkojn de grandega valoro kiel la trezoro de Sankta Marko kaj la *Pala d'Oro*, la tabulo sur la ĉefa altaro, kovrita per sanktaj bildoj el oro kaj juvelŝtonoj, kiu enhavas la relikvojn de la Evangeliisto Sankta Marko.

Tagmanĝo en restoracio dum la vizito. Reveno al la hotelo, vespermanĝo kaj tranokto.

***9.08 Venecio kaj la insuloj de la Laguno***

Matenmanĝo en la hotelo, elregistriĝo, liberigo de ĉambroj kaj depono de la pakaĵoj en la deponejo de la hotelo. Renkontiĝo kun la gvidanto kaj surŝipiĝo por viziti la famajn insulojn de la venecia laguno: Burano, Murano kaj Torcello. Burano estas konata pro siaj famaj koloraj domoj kaj tradicia puntofarado; en Murano, fama tra la tuta mondo pro vitrolaborado, oni vizitos laboratorion por elmontro de tiu ĉi antikva arto. Fine oni alvenos al Torcello, unu el la plej malnovaj kaj prosperaj setlejoj de la Serenissima (historia kromnomo de Venecio).

Tagmanĝo dum la vizito.

En la malfrua posttagmezo, reveno al la hotelo por repreni la pakaĵojn.

Prezo de la ekskurso:

- en unupersona ĉambro 1200 € p.p.
- en dupersona ĉambro 990 € p.p.

# Ekskursoj dum la kongresa semajno

## TUTTAGAJ EKSKURSOJ

Ĉiuj tuttagaj ekskursoj inkluzivas:

- Vojaĝon per turisma buso de kaj al Torino
- Tuttagan gvidanton en la itala kaj akompananton/tradukanton en Esperanto
- Kapaŭskultilojn
- Tagmanĝon

## E1 ALBA, LANGHE kaj ROERO (lundo, 31-a de julio, 8h30-18h00)



Oni alvenos en Alba, la monda ĉefurbo de trufo. La urbo, kvankam ne tre granda (Alba havas iom pli ol 30 mil loĝantojn), proponas sennombran gamon da vidindaĵoj: lokojn de arto kaj religio, epokajn konstruaĵojn, la famajn turojn kaj rimarkindan gastronomian kaj vinproduktadan tradicion. Oni tagmanĝos en Alba kaj poste per turisma buso laŭiros la belegan teritorion de Langhe kaj Roero, kiuj aperas unuavide kiel vitejoj, ĝis kie la okulo povas rigardi, mildaj montoflankoj, malgrandaj vilaĝoj, turoj kaj kasteloj. Ĝi fakte estas teritorio, inter la plej belaj en Piemonto, agnoskita en 2014 de Unesko kiel Monda Heredaĵo.

La ĉefaj etapoj estos la vilaĝo *Barolo*, kiu donis sian nomon al la reĝo de la vinoj, *Monforte d'Alba*, *La Morra*, kie – se vetero tion permesos – oni haltos ĉe la benkegoj por memorfoto.

Fine oni atingos la vilaĝon *Grinzane Cavour*, kie oni vizitos la faman kastelon, kiu gardas en si multajn aspektojn de la loka kulturo: kamparanan, vinfaradan, politikan ktp. Ĉion oni povos viziti promenante en la kastelaj ĝardeno kaj salonegoj.

Prezo: 84 €

## E2 kaj E3 MILANO (mardo, 1-a de aŭgusto, 08h30- 18h30)

La urbovizito de Milano, la dua plej granda urbo en Italio, komenciĝas de la *Castello Sforzesco*. La Kastelo estas renesanca; komence konstruita en la dekkvina jarcento fare de Galeazzo II Visconti kiel defendfortikaĵo, ĝi tiam spertis multajn plivastigojn, detruojn kaj havis diversajn posedantojn. La *Castello Sforzesco* enhavas plurajn muzeojn: la Egiptan, la kolekton de Muzikaj Instrumentoj, la kolekton de Dekoraciaj Artoj, la Pinakotekon kaj la Muzeon de Antikva Arto kun eksterordinaraj ĉefverkoj, kiel ekzemple *Pietà Rondanini*



de Mikelanĝelo kaj la *Sala delle Asse* (salono de la Tabuloj), pentrita de Leonardo da Vinci.

Post la vizito de la Kastelo, la ekskurso plu daŭros piede, trairante *Largo Cairoli*, ĝis la restoracio kie oni tagmanĝos. Oni piediros al *Via Dante*, unu el la plej gravaj stratoj en la urbo kaj komenco de la piedira areo, kun belaj altvaloraj butikoj kaj pluraj renomaj kafejoj. Plu irante oni troviĝos en *Piazza Cordusio*, en la financa centro de Milano kun ĝiaj imponaj konstruaĵoj. Ne malproksime troviĝas la sidejo de la Milana Borso, en *Piazza degli Affari*.

De *piazza Cordusio* oni laŭiros *Via Mercanti* por atingi *Piazza Mercanti*, post kiu ekmontriĝos la *Duomo*. Oni eniros en la *Duomo*, kie la gvidantoj rakontos pri ĝia longa historio.

Eblas aldona vizito de la Monaĥejo *Santa Maria delle Grazie*, kie troviĝas la mondfama pentraĵo de Leonardo da Vinci, la *Cenacolo* (Lasta vespermanĝo de Kristo). *Por elekti ĝin, mendu la ekskurson E3.*

Post la vizito oni promenos al placo *Duomo* (entute la devojiĝo daŭros ĉirkaŭ unu horon piede) por reatingi la ceteron de la grupo.

Poste laŭ la piedira strato Vittorio Emanuele oni alvenos al *Piazza della Scala* kun la mondfama teatro.

Prezo:

- E2 (sen Cenacolo) - 110 €
- E3 (kun Cenacolo) - 125 €

## E4 ĜENOVO (sabato kaj merkredo, 08h30- 18h30)




Alveno (buse) al la fervoja stacidomo dediĉita al la Admiralo Andrea Doria, la Princo. Oni komencos la viziton de la urbocentro de Ĝenovo, urbo kiu naskiĝis antaŭ 2500 jaroj. Promenante tra la tipaj *caruggi* (stratetoj), oni malkovros la etoson de la ĉiutaga vivo de la ĝenovanoj kaj flaros la salan aeron de la maro, la aromojn de diversnacia gastronomio kaj oni profitos de la amaso da koloroj de la ĉi-tiea multnacieca loĝantaro. Survoje, kune kun lokaj gvidantoj oni vizitos la malnovan urbon, ĝiajn nobelajn palacojn, preĝejojn kaj muzeojn.

Matene oni admiros la mezepokajn domojn de la *Commenda di San Giovanni in Pré* (ampleksa mezepoka konstruaĵo kun du preĝejoj), la eksteran parton de la Palaco de la Princo, la unua renesanca loĝejo

de la urbo, la lokojn de la historia galera ŝipfarejo, nun sidejo de la Mara Muzeo "Galata", la historiajn kajojn kun gruoj kaj la faman lumturon, la *Lanterna*, simbolon de la urbo.

Malfrumatene oni alvenos en la koron de la malnova haveno, nome *Porto Antico*, renovigita en 1992 de la ĝenova arkitekto Renzo Piano. De tie videblas la apuda monteto *Castello* kie estis fondita en la 6-a jarcento a.K. la etruska setlejo *Janua*. Oni mallonge haltos por admiri la Katedralon de Sankta Laŭrenco, la plej bonan ekzemplon en la urbo de la tiel nomata "mediteranea gotika" stilo.

Dum la tagmanĝo, oni gustumos tipajn ĝenovajn specialaĵojn ĉe restoracio.

Posttagmeze oni daŭrigos la viziton de la urbo: la Duka Palaco kaj Placo De Ferrari, kie oni admiros de ekstere la Teatron *Carlo Felice* kaj la Borson. De tie, oni iros al *Via Garibaldi* por admiri ĝiajn palacojn, listigitajn en la monda heredaĵo-listo de Unesko.

Antaŭ la fino de la ekskurso, oni lifte supreniros ĝis la kvartalo *Castelletto* por admiri belegan panoramon de la urbocentro. De tie, oni reiros al la fervoja stacidomo por buse reveni al Torino.

Prezo: 72 €

## E5 VERCELLI KAJ KASTELO MASINO
## (merkredo, 2-a de aŭgusto, 08h00- 18h30)



Renkontiĝo kun la gvidanto kaj la lokaj esperantistoj en *Piazza Mazzini*.

La ekskurso piede atingos la preĝejon de *San Cristoforo* kun grandiozaj deksesajarcentaj freskoj de Gaudenzio Ferrari, la Judan Kvartalon kun ekstera vizito de la Sinagogo, *Piazza Palazzo Vecchio*, kun vido de la antikva Urba Turo, kaj *Piazza Cavour*, la batantan koron de la urbo, superrigardatan de la konturo de la antikva *Torre dell'Angelo*. Oni daŭrigos la promenadon laŭ la *Via dei Palazzi Nobiliari*, nun konata kiel *Via Duomo*, por poste eniri en la Katedralon de *Sant'Eusebio* por admiri la altvaloran monumentan krucifikson parte en reliefornamita arĝentfolio kaj parte orumita, el la mezepoko. Tiam oni alvenos al la Abatejo *Sant'Andrea*, ĉefverko de romanik-gotika arkitekturo.

Reveno al la urbocentro por atingi la restoracion.

Post la tagmanĝo oni atingos buse la kastelon *Masino*, situantan meze de granda monumenta parko. Ĝi estis la pompa restadejo de unu el la plej gloraj piemontaj familioj, devenanta, en mito, de Arduino, la unua reĝo de Italio: miljara historio rakontita en vojaĝo tra freskitaj kaj meblitaj salonoj.

Oni vizitos la internon de la kastelo kaj ankaŭ ĝian ĝardenon kaj povos ripozi kafumante en la panorama terasa kafejo.

Prezo: 88 €

## E6 SALUZZO, ABATEJO DE STAFFARDA KAJ FERVOJA MUZEO DE SAVIGLIANO (merkredo, 2-a de aŭgusto, 08h30- 18h00)



Oni atingos Saluzzo, kiu aspektas kiel tipa dekkvara-jarcenta monteta vilaĝo: malgrandaj pavimitaj stratoj, preĝejoj kaj elegantaj nobelaj palacoj kun iliaj ĝardenoj konsistigas la historian centron.

La gvidanto akompanos la piediran viziton de Saluzzo, kun halto ĉe la ĉefaj monumentoj de la urbo: la *Castiglia*, Preĝejo de San Giovanni kun ĝia klostro, la Torre Civica, Casa Cavassa kaj la Katedralo. Poste, la ekskurso atingos per buso la abatejon *Santa Maria di Staffarda,* kiu estas unu el la grandaj mezepokaj monumentoj de Piemonto; konservita plejparte en sia integreco de la momento de maksimuma ekspansio.

Post la vizito oni tagmanĝos en la tipa restoracio apuda al la abatejo *il Sigillo* (la sigelo).

Post la manĝo oni atingos Savigliano, kie troviĝas la Piemonta Fervoja Muzeo. Ĝi kolektas kaj konservas lokomotivojn, vagonojn, aparatojn kaj memorindaĵojn, kiuj faris la historion de fervoja transporto en Piemonto kaj ne nur. Nuntempe la kolekto inkluzivas pli ol sesdek veturilojn, inter kiuj lokomotivojn, ĉarojn, ŝarĝvagonojn kaj specialajn veturilojn (inkluzive de gruo el 1860) kaj ankaŭ plurajn unikajn pecojn.

La viziton gvidos volontulo de la muzeo, kiu estos malfermita speciale por nia grupo.

Prezo: 82 €

## E7 AOSTA VALO (merkredo, 2-a de aŭgusto, 08h30- 18h00; vendredo, 4-a de aŭgusto, 08h30- 18h00)



La Aosta Valo, ĉe la limo inter Francio kaj Svislando, estas kovrita de majestaj montoj inter kiuj troviĝas la pintoj plej altaj en la Alpoj kiel Matterhorn, la Roza Monto, Granda Paradizo kaj ĝia moŝto la Blanka Monto, kiu kun siaj 4810 m. ne havas rivalojn en Eŭropo.

Krom belegan naturon, en Aosta valo oni povas trovi romiajn restaĵojn (la nomo mem, Aosta, devenas el la latina Augusta) kaj mezepokajn fuortojn.

Unu el la plej famaj estas la kastelo Fenis, kiun oni vizitos interne kaj ekstere, inkluzive de la apuda muzeo pri loka metia arto.

Poste oni veturos al Aosta, kie, post la tagmanĝo, okazos vizito kun profesia gvid-

anto laŭ la historia centro de la urbo kun haltoj ĉe la ĉefaj monumentoj kaj vidindaĵoj: Arko de Aŭgusto, *Porta Praetoria*, Romia Teatro, Kriptoportiko, Kolegio de *Sant'Orso*, Katedralo, *Piazza Chanoux*.

Prezo: 95 €

## E8 LAGO MAGGIORE (merkredo kaj ĵaŭdo, 07h30-18h00)



La *Lago Maggiore* (La Plej Granda lago, laŭlitere tradukite) aŭ *Lago Verbano*, kiu formiĝis dum la glacia epoko, estas la plej okcidenta el la subalpaj grandaj lagoj kaj la dua plej granda post la Lago de Garda.

Ĝiaj anguloj troviĝas en pluraj regionoj: Piemonto, Lombardio, kaj Svislando, kies kulturoj videblas en la riĉeco de historio kaj artaj atestaĵoj.

Ĝia feliĉa geografia pozicio favoras la kreskon de mediteranea vegetaĵaro, kun belaj famegaj ĝardenoj en kiuj oni povas admiri eĉ tropikajn plantojn.

Dum la ekskurso oni vizitos la belegajn Borromeajn Insulojn enŝipiĝante de la haveno de Stresa ĝis *Isola Bella*, kie oni vizitos *Palazzo Borromeo* kaj ĝian ĝardenon.

Poste oni atingos per privata pramo *Isola dei Pescatori* (Insulo de la fiŝistoj), kie oni tagmanĝos.

Post la manĝo la grupon atendos la tria gemo de la lago, *Isola Madre*, kie oni vizitos la mondfaman botanikan ĝardenon kaj la nobelan palacon.

Fine oni reatingos *Stresa* por buse reveni al Torino.

Prezo: 110 €

# DUONTAGAJ EKSKURSOJ

## D1 LAVAZZA MUZEO (dimanĉo, 30-a de julio, 14h30-18h30; vendredo, 4-a de aŭgusto, 08h30-12h30)

La kafo-firmao *Lavazza* naskiĝis en malgranda butiko en la urbocentro de Torino en 1895. Post pli ol 125 jaroj, *Lavazza* estas nun firmao tutmonde konata, kun tre speciala centra oficejo ene de la *palazzo Nuvola* ("nubo"), arkitektura mirindaĵo en la kvartalo *Borgo Dora*, kiu ankaŭ entenas la interaktivan muzeon *Lavazza*. Malkovru en ĝi la historion de la familio *Lavazza*, de la kafo kaj la sekretojn de ĝia prilaborado, la belegajn reklamilojn kaj la sloganojn de niaj generacioj.

Dum la vizito oni povos ankaŭ spekti arĥeologiajn malkovraĵojn elfositajn dum la konstruado de la muzeo.

Je la fino de la vojaĝo, eta gustumado atendos la ekskursantojn.

Prezo: 35 €

## D2 SACRA DI SAN MICHELE (SANKTEJO DE SANKTA MIKAELO) (lundo kaj vendredo, 08h30-12h30)



Unu el la simboloj de la Regiono Piemonto, kiu, laŭdire, inspiris Umberto Eco por la romano "*Il nome della rosa*" (La nomo de la Rozo), estas la plej mirinda ekzemplo de loka gotika arto.

La sanktejo estas unu el la plej grandaj religiaj arkitekturaj konstruaĵoj el la romanika epoko, en la tuta Eŭropo, el la monto *Pirchiriano* (962 metrojn) ĝi superrigardas la Suzan valon. Ĝi estis konstruita de la benediktaj monaĥoj (aŭ, laŭ legendo, de anĝeloj en ununura nokto) kaj dum la 12-a jarcento ĝi iĝis gastejo por pilgrimantoj kiuj veturis laŭlonge de la *Via Francigena*, antikva itinero el Francio al Romo kaj Apulio, por enŝipiĝi al la Sankta Lando.

Oni venos al la parkejo situanta 800 metrojn for, kaj piede atingos la Sanktejon. Temas pri ĉirkaŭ 15-minuta promenado laŭ supreniranta deklivo (do **povas ne taŭgi por homoj kun marŝproblemoj pro longa supreniro**).

Interna gvidanto akompanos la ekskursantojn dum esplorado de ĉiuj facetoj de tiu ĉi loko, plena je historio, spiriteco kaj beleco.

La interna vizito daŭros ĉirkaŭ unu horon, poste oni povos libere esplori la ĉirkaŭaĵon, kiu estas bela mezmontara medio.

Prezo: 35 €

## D3 MUZEO MARTINI (lundo, 31-a de julio, 14h30-18h30; vendredo, 4-a de aŭgusto, 14h30-18h30)

Alessandro Martini, iluminita entreprenisto kun tutmonda vizio, kaj Luigi Rossi, la kreipova menso, kies botanikaj aromoj tiklis la nazon de preterpasantoj sur *Via Dora Grossa* en Torino... Estis la jaro 1863 kiam ilia ĵusnaskita partnereco realiĝis en sia unua vermuto: la *MARTINI Rosso*. La recepto por ĉi tiu originala miksaĵo estas same aktuala hodiaŭ kiel tiam.

Ekde 1864, la *Pessione*-kamparo en Piemonto estas hejmo de la fabriko kaj de ĝia muzeo. La fervoja linio Torino-Ĝenovo pasas ĝuste apud ĝi kaj ludis esencan rolon en la vastiĝantaj ambicioj de la entrepreno. Tutaj generacioj de familioj helpis konstrui tion, kio *MARTINI* estas hodiaŭ. La lokanoj fieras pri ĝi kaj la intensa dolĉeco de ĝia aromo trapenetras la ĉirkaŭan aeron.

Kaj eĉ la fama sekreta agento 007, James Bond, ne povis trinki vodkon sen *Martini* seka: miksita se ne skuita…

Oni vizitos *Casa Martini* akompanataj de internaj gvidantoj, kiuj forkondukos la ekskursantojn per la rakontoj pri vermuto, botaniko kaj ĝia produktado.

Oni eĉ montros la produktejon kaj la vizito finiĝos per gustumado de *Martini*-produktoj, kujn oni povos poste aĉeti en la butiko.

Prezo: 39 €

## D4 PALACO DE VENARIA REALE
## (mardo, 1-a de aŭgusto, 8h30-12h30)

La *Venaria Reale* (reĝa ĉasejo) estas grandega konstruaĵo, kie la reĝa familio Savoia dediĉis sin al ĉasado, feriado kaj lukso.

La Reĝa Palaco estis konstruita en speciala momento por arto, kiam ĉiuj suverenoj de Eŭropo konkuris por konstrui mirindajn Palacojn kiel ekz. la Palaco Schönbrunn, Versajlo ktp.

Dum la ekskurso videblos la reprezenta etaĝo, kie troviĝas la antikvaj dukaj loĝejoj, la luksaj ĉambroj el la 18-a jarcento de la arkitekto Filippo Juvarra kaj finfine la ĝardenoj, kun sia panoramo super la Parko *della Mandria*.

En la "Parko *della Mandria*" okazos la Internacia Infana Kongreseto.

Prezo: 39 €

## D5 KASTELO DE RIVOLI
## (ĵaŭdo, 3-a de aŭgusto, 14h30-18h30)

Ĉirkaŭata de la Alpoj de Val Susa kaj staranta sur la pinto de monteto, dum jarcentoj la Kastelo de Rivoli estis luksejo de la Reĝa Familio Savoia, poste armea komandejo kaj de 1984 - sidejo de la Galerio de Nuntempa Arto. Dum la ekskurso, oni vizitos la belajn salonojn de la Kastelo, malkovrante historiojn kaj kuriozaĵojn de la gravuloj, kiuj paŝis tra la koridoroj de la reĝaj salonoj. Krome, oni povos viziti la ekspozicion pri nuntempa arto. Post la ekskurso eblos promenadi en la parko ĉirkaŭanta la kastelon kaj spekti la mirindan panoramon aŭ simple kafumi en la interna kafejo.

Prezo: 31 €

## PIEDIRAJ EKSKURSOJ EN TORINO

Okazos ankaŭ 4 ekskursoj en Torino, kiuj fokusiĝas sur malsamaj historiaj epokoj kaj stiloj. En ĉiu ekskurso, oni havos la ŝancon vidi la belecon de Torino kaj ekscii pli pri la kongresa urbo kaj ĝia riĉa kultura pasinteco. Tiuj ĉi ekskursoj povas ne taŭgi por homoj kun marŝproblemoj pro longa piedirado.

## D6 TORINO: URBA RONDIRO
## (sabato, lundo, mardo 14h30-18h30)

Estas perfekta por tiuj, kiuj volas esplori la ĉefajn monumentojn de Torino. Dum la ekskurso oni povos vidi la romiajn kaj mezepokajn partojn de la urbo, la barokajn palacojn kaj la lokojn kie fariĝis la historio de Italio, por tiel ekkoni pli la historion kaj arkitekturon de la urbo.

Prezo: 15 €

## D7 TORINO: ROMIA URBO
## (mardo, 1-a de aŭgusto, 09h00- 13h00)

Celas montri la heredaĵon de la romia periodo en Torino, ĝi fokusiĝas sur la monumentoj de Augusta Taurinorum, eĉ la plej kaŝitaj. Dum la ekskurso, oni travivos fascinan vojaĝon en la pasinteco kaj eltrovos multajn interesaĵojn pri la romia heredaĵo de Torino.

Prezo: 15 €

## D8 TORINO BAROKA
## (ĵaŭdo, 3-a de aŭgusto, 9h00-13h00)

Konatigos kun la baroka arkitekturo en Torino. Oni povos vidi ĉefverkojn de famaj barokaj arkitektoj dum la pieda rondiro, kaj ekscii pli pri tiu stilo de arkitekturo kaj ĝia signifo en la historio de Torino.

Prezo: 15 €

## D9 TORINO: LAŬ LA RIVERO
## (dimanĉo kaj vendredo 14h30-18h30, lundo 9h00-13h00)

Oni vizitos la *Parco del Valentino*, kiu laŭiras la riveron Pado, kaj promenos laŭ la rivero por ĝui la freŝon de la parko, admiri la kastelon de Valentino, konstruitan ekde la 17-a jarcento, kaj la Mezepokan Vilaĝon ĝis la belega *Fontana dei dodici mesi* (Fontano de la dekdu monatoj).

Prezo: 15 €

## D10 TORINO: BICIKLA URBOESPLORADO
## (ĵaŭdo, 3-an de aŭgusto, 9h00 - 12h30)

Dum ĉirkaŭ 3 horoj, oni faros rondiron de 25 km, kiu permesos ĝui parkojn riĉaj je naturo, industriajn arĥeologiaĵojn kaj la plej belajn urbopartojn.

La ekskurso taŭgos por personoj sufiĉe trejnitaj, tamen oni iros trankvile por povi ĝui la pedaladon. Eblos ofte refreŝiĝi ĉe la famaj verdaj taŭroj (turèt en la Torina lingvo) - senpagaj fontanoj, kiuj troviĝas ĉie en la urbo.


La prezo inkluzivas luadon de biciklo kaj gvidadon. Aldone eblas lui kaskon (2€) - ĝi ne estas deviga, sed rekomendinda. Partoprenantoj kun propra biciklo ricevos repagon de 5€. Oni ne forgesu mencii sian altecon en la mendilo por ricevi taŭgan biciklon!

Prezo: 25 €

# Tabelo de dumkongresaj ekskursoj

T = tuttaga ekskurso; M = duontaga ekskurso matene; P = duontaga ekskurso posttagmeze.

| | Sab 29/07 | Dim 30/07 | Lun 31/07 | Mar 1/08 | Mer 2/08 | Ĵaŭ 3/08 | Ven 4/08 | prezo, € |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| E1 - Alba, Langhe kaj Roero | | | T | | | | | 84 |
| E2 - Milano sen Cenacolo | | | | T | | | | 110 |
| E3 - Milano kun Cenacolo | | | | T | | | | 125 |
| E4 - Ĝenovo | T | | | | T | | | 72 |
| E5 - Vercelli kaj Kastelo de Masino | | | | | T | | | 88 |
| E6 - Saluzzo, Abatejo kaj Fervoja Muzeo | | | | | T | | | 82 |
| E7 - Aosta Valo | | | | | T | | T | 95 |
| E8 - Lago Maggiore | | | | | T | T | | 110 |
| D1 - Lavazza Muzeo | | P | | | | | M | 35 |
| D2 - Sacra di San Michele | | | M | | | | M | 35 |
| D3 - Muzeo Martini | | | P | | | | P | 39 |
| D4 - Palaco de Venaria Reale | | | | M | | | | 39 |
| D5 - Kastelo de Rivoli | | | | | | P | | 31 |
| D6 - Torino: Urba Rondiro | P | | P | P | | | | 15 |
| D7 - Torino: Romia urbo | | | | M | | | | 15 |
| D8 - Torino: Baroka | | | | | | M | | 15 |
| D9 - Torino: Laŭ la rivero | | P | M | | | | P | 15 |
| D10 - Torino: Bicikla urboesplorado | | | | | | M | | 25 |





# Bankedo

Prezo:
87 €

La bankedo okazos en la korto de la Reĝa Palaco, *Palazzo Reale di Torino*. Ĝi komenciĝos je la 19h30, sed ni varme invitas vin alveni jam je la 19h00 por la bonveniga aperitivo (trinkaĵoj kaj manĝetoj).

### *MENUO 1*

*Antaŭpladoj:* Legoma flano kun krema fromaĝo; folipasta korbeto kun ŝimfromaĝo [gorgonzola], piroj kaj juglandoj; miksosalato je piemonta maniero

*Unua plado:* Pastopoŝoj plenigitaj per borago kun herba saŭco

*Dua plado:* Lardumita fileo de bovido kun rustikaj bakitaj terpomoj

*Deserto:* Buneto [tipa piemonta dolĉaĵo] kun grajnerigitaj makaronoj kaj arbarfruktoj

### ***MENUO 2*** (taŭga por vegetaranoj)

*Antaŭpladoj:* Legoma flano kun krema fromaĝo; folipasta korbeto kun ŝimfromaĝo [gorgonzola], piroj kaj juglandoj; miksosalato je piemonta maniero

*Unua plado:* Pastopoŝoj plenigitaj per borago kun herba saŭco

*Dua plado:* Fabacaj buletoj kun garnaĵo

*Deserto:* Buneto [tipa piemonta dolĉaĵo] kun grajnerigitaj makaronoj kaj arbarfruktoj

### *TRINKAĴOJ*

Akvo, piemontaj vinoj: ruĝa: Dolcetto, blanka: Roero Arneis, kafo

# Aranĝoj ĉirkaŭ la UK

**56-a Kongreso de ILEI** kaj **79-a Internacia Junulara Kongreso (IJK)** okazos komune en Linjano Orsabla, Italio (Itale: Lignano Sabbiadoro) de la 5-a ĝis la 12-a de aŭgusto 2023. Pliaj informoj: https://ilei.info kaj https://ijk2023.tejo.org/.

**51-a Internacia Infana-adoleskanta Kongreseto (IIK)**, okazos de la 29-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto 2023 en Parko La Mandria apud Torino. La temo de la kongreseto estas: "Sporto kaj Naturo". Pliaj informoj: https://iik.uea.org/.

# Pliaj informoj

**Disdonado de reklamiloj kaj informiloj**

UK estas la plej bona okazo por informi la movadan publikon pri nova iniciato, speciala agado de via faka asocio, reklami novan eldonaĵon, fari donacon al ĉiuj kongresanoj, anonci renkontiĝon, kurson, varon ktp. Plej efike estas meti vian informilon en la dokumentujon, kiun ricevas ĉiu kongresano. Tiu servo kostas € 275 kaj necesas peti permeson de la Estraro de UEA (bv. kontakti la Kongresan fakon ĉe kongresoj@co.uea.org). Nenio rajtas esti distribuata kongreseje sen tiu permeso.

**Salonmendoj, standoj kaj budoj**

Ĉiuj fakaj asocioj konataj de UEA ricevis mendilon pri salono por sia kunveno dum la UK. Salonmendoj devas atingi la Kongresan fakon ĝis la 30-a de aprilo 2023. Malfruajn mendojn oni traktas malprioritate kaj eblas postuli por ili ekstran lupagon. Salonon por kunveno ne povas mendi individuo (ekz. por prelego), sed nur asocio. Se via asocio ne ricevis la mendilon, bv. peti ĝin ĉe la konstanta adreso (kongresoj@co.uea.org).

Asocioj, movadoj, firmaoj, eldonejoj, revuoj aŭ grupoj, kiuj volas aparte informi, disdoni broŝurojn, kolekti kotizojn k.s., povas mendi standon aŭ lokon por instali sian budon dum la kongreso (€ 400). La budon oni ne rajtas uzi por komercaj celoj (vendado de libroj, insignoj k.s.), sed jes por kolekti mendojn.

**Kongresa Libroservo**

Jen unika okazo aktualigi vian bibliotekon: en la Kongresa Libroservo multaj novaj libroj estos unuafoje lanĉitaj kaj plurajn titolojn eblos aĉeti kun speciala rabato. Ĝi havas ekskluzivan rajton vendi librojn kaj aliajn esperantaĵojn dum la UK. Por vendigi viajn eldonaĵojn, necesas oferti ilin al la Libroservo de UEA (CO) minimume du monatojn antaŭ la kongreso.

**Pagmanieroj**

Estas diversaj kontoj kaj manieroj per kiuj oni povas pagi siajn kongresajn mendojn. Elektu tiun, kiu estas por vi la plej oportuna. La pagojn por mendoj faru rekte laŭ unu el jenaj manieroj:

Via UEA-konto. Vi povas plenigi vian UEA-konton per bankokarto pere de sistemo Stripe (ne forgesu mencii vian UEA-kodon) uzante tiun ĉi ligilon.

**Banko.** Per ĝiro al unu el jenaj kontoj, je la nomo de Universala Esperanto-Asocio:

- Nederlando: ABN AMRO-Bank, IBAN: NL86 ABNA 0426 9014 44 (BIC: ABNANL2A);
- Germanio: Postbank, IBAN: DE51 3701 0050 0318 2915 09 (BIC: PBNKDEFF).

Monsendojn al ĉi tiuj du kontoj bv. fari nepre en EUR. Eventualajn administrajn bankokostojn ĉiam pagas la mendanto.

**PayPal.** Eblas pagi pere de PayPal uzante la adreson financoj@co.uea.org. Bv. aldoni 5% al la pagata sumo pro administraj kostoj.

**Asekuro.** La kongreskotizo inkluzivas nenian asekuron: ĉiu aliĝinto zorgu mem pri taŭga vojaĝasekuro. La UK ne repagas mendojn (loĝado, ekskursoj k.a.) se la malmendo venas post la limdato. Tial estas konsilinde asekuri sin kontraŭ eventuala nepartopreno.

**Donacoj**

La UK bonvenigas donacojn por:

- Ĝenerala Kaso: por la ĝenerala subteno al la organizado de UK.
- Adoptaj Gepatroj: subvencias partoprenon en la Infana Kongreseto de infanoj el landoj kun transpagaj problemoj.
- Fondaĵo Canuto: helpas membrigon al UEA de esperantistoj el landoj kun transpagaj problemoj.
- Fondaĵo Partoprenu UK-on: helpas al kongresanoj el triamondaj landoj.
- Blindula Kaso: helpas al blindaj kongresanoj.
- Arta Kaso: helpas financi artistojn por prezentiĝo dum Universalaj Kongresoj.
- Infana kongreseto: helpas kovri kostojn de Internacia Infana Kongreseto.
- Klimato – $CO_2$ - por ekologiaj projektoj, kompensantaj la poluadon, okazantan i.a. pro transportado de kongresanoj al UK.

Mencio pri ĉiu donacinto aperos en la Kongresa Libro kaj en la revuo *Esperanto*.

# Sekvu nin

@universala.esperanto.asocio
@uktorino2023

www.esperanto.it/torino2023

https://uk.telegramo.org/

www.uea.org/kongresoj

# Kontaktoj

Centra Oficejo de UEA, Kongresa Fako:
Nieuwe Binnenweg 176,
NL-3015 BJ Rotterdam,
Nederlando.

**Ni petas kontakti nin ĉefe retpoŝte, ĉe la retpoŝtadreso:** kongresoj@co.uea.org

Pri ĉiuj temoj rilataj al la Kongreso, bonvolu kontakti ne la LKK, sed la Kongresan Fakon.




Subtenu ĝin per donaco al la Fondaĵo Afriko de UEA:

[uea.org/alighoj/donacoj/afriko](https://uea.org/alighoj/donacoj/afriko)